GISTO, FEB-2008
Redaktas ottovaske@ibest.com.br
95760-000 Kaiurbo-RS
ttt-kongrua skribo

02020202020202020202020202020202020202020202020202020202020202020202020202020

VERDA KAFO =VK

Rondanoj sxerce primEkas la tradician nomon. Gxi devus nomigxi Verda Biero aù Verda Vino, ili diras kaj pravigas da sugeston: oni ja preferas fridan bieron al varma kafo, kiam la media klimato sxvitigas; preferas bongustan vinon, kiam extere fajfas la bone konata Minuano, kiam la gaùchoj sin envolvas per supermantelo nomata ponche (aù poncho) kaj ne spertaj vizitantoj tremas pro forgeso surmeti lanvestajxon. Kutime, tamen, dum oni atendas la alvenon de pliaj kompanoj oni frandas tason da bongusta kafo, por pravigi la baptonomon aù mendas alion laùvole.

SANGUINETTI

Ofte oni memoras nian plej malavidan mecenaton, samideanon Ivo Sanguinetti kiu modesta, preferas resti kvazaù kasxita en sia hejmo kun la diligenta edzino Izaùra. Li, arkitekto, klera homo, tamen povus iam tiam montrigxi almenaù pere de skribajxoj kun opinioj ril. al GEA kaj la gaúcha E-movado, se la sano permesas tion.

MALSANAJ SAMIDEANOJ

Bonvenus ke nia samideanaro sendus al Gisto, por gxenerala diskonigo, la sanstaton de geamik(in)oj pri kiuj la ceteraj VK-rondanoj nur scias kaj rimarkas la foreston de niaj chiumonataj kunsidoj. Ja estas pluraj. Oni sopiras revidi kaj aùdi ilin.Miriam...Lusja,Nitha kaj ceteraj bonaj E-uzantoj.”Que passa?”.

DEFIO (Sxerca)

Jen rimedo por fermi la busxon de pretendemaj gesamideanoj, kiuj paradas per anonco, ke ili amas Esperanton sed, kiam ili ekparolas ne eltenas lingvan kontrolon. Oni igu ilin legi, **flue**, jenan lerte kunmetitan rimaron:

SURMARE
Blondj1l’ velas surmare,
De Hin2jo al Peruo.
Dis3s lin lia gitaro,
Taba4’ porl’enuo,
Se5beroj porl’ malsato
Char ek6tis li soldato.
Jen 7aras sin el trupo
Iu f8’ pusxante blekon:
„9zas min chi putra supo“
Kaj saltis surl’ fer10on.

Gxi taùgas por testi la legokapablon, ne rapidan, far finlernintoj de baza E-kurso.
Delonge mi vane atendis oportunon prezenti chi-tekston antaù multnombra kunsido. Nun, jen gxi, por ke vi trejnigxu, kaj farigxu kapablaj laùtlegi la rimaron, sen stumbli, senerare.

SPICAJXO

Kun granda bedaùro mi konstatas ke pluraj, se ne multaj Gisto-legantoj ne plene komprenas mian simplan Esperanto, chu pro vortkunmetoj chu pro ilia magra vortprovizo. Plachus al mi iam cheesti paroligan kurson laù teksto samtempe legata, por havigi al mi ideon, pri kiom el gxi ili komprenas antaù ol la instruisto sufiche klarigis la trovitajn vortkunmetajxojn kaj mallongigojn

kutime trovatajn en tekstoj. Manke de tio, la praktikantoj kvazaù abomenas legi E-tekstojn kaj ne akiras fluecon. – Mi miras ke, malgraù tio, ne multaj el la gelegantoj petas al mi klarigi teksterojn.Diveneblas ke, pro la sama motivo okazas la manko de reagoj al miaj proponoj kaj ne kontentigas min. Ankaù eblas ke Gisto-temoj konsideratas tro sensalaj. Eble la gekompanoj preferus ke mi spicu la tekstojn per seksaj aferoj. Mi povas rakonti, ekz. scenon spektitan en TV-programo regata de la populara Ratinjo. Por mi gxi estis la plej ekscitiga iam vidita. Mi petas ke chiu BV manifestigxu chi-rilate, chu mi priskribu la scenon. Gxi estas ne banala sed ankaù ne pornoa. Manke de kontribuoj viaflanke mi pensis pri Gxi. Iam mi petis al vi, karaj gelegantoj, ke vi devus degni disdividi viajn travivajxojn kun niaj rondanoj sed, mia peto falis en dezerton, kiel kutime...ba!

CRI

Chiutage mi kontrolas la ondopropagadon de tiu radio. Lastatempe gxia intenseco tre varias tamen averagxe gxi estas bone aùdebla per eta ricevilo achetita en surstrata budo en POA. En la 14/02 mi ricevis, prokrastite de la Posxto, leteron kun jarsxangxaj salutoj laù kiu oni sciigxas ke Cho-Ro-I dum 2007 ricevis sume 6738 korespondajxojn. Mi atendas ke ili informu specife, kiom da ili estis senditaj el la Gaùcholando, por kontroli chu niaj gesanideanoj plenumas la devon necesan por ke Cho-Ro-I restu sxirmita de la chinia registaro gxis la tuta mondo farigxis sagxa kaj adoptis la duan lingvon, la vere internacian, la transnacian. – Aldonendas, ke la bonkoraj chinaj Cho-Ro-I kaj MIKROFONE-estraroj faris richan donacon al mia edzino,nome, eksterordinare kaj bele broditan manposxon el pura chinia silko. – Kortusxite mi dankas kaj reciprokas la bondezirojn!

HIGIENO

Ne fidu, ke via dentaro restas tute pura post kiam vi zorge brosis gxin! Montrigxas nekredebla la fakto ke, surprizas vin la uzo de interdenta broso kaj vi pentas,(mlfrue,kiam vi devos pagi altajn sumojn al via dentisto) ke vi de longa tempo ne zorgis multe pli akurate pri via dentaro. Neniam mi vidis instruan programon kie oni parolas pri interdenta broso! Chu dentkuracistoj sufokas tiun specifan instruadon, por havigi al si pli da klientoj?

Bonhumoro

Virinoj versxajne ne elpensas bonhumorajxojn, tial mi trovas nur anekdotojn kiuj primekas iliajn facetojn ne laùdindajn, chefe pro babilemo.

PARADIZO

Veterana edzo al sia edzino:

- Mi songxis ke mi estantis en la Chielo, chirkaùita de angxeloj kiuj ludis harpon.
- Kaj mi, chu mi estis tie?
- Karulino, mi diris ke mi estis en la Chielo. Vi ne estis tie.

ENDRINKEJA AFISXO

Chi-ene vi pasigos kelkajn plezurigajn momentojn. Kiam vi hejme alvenos, via edzino estos furioza. Do, por ne fronti kverelojn, kial ne resti plie?

LAÙDO-AVIDO

Pentristino gastigas geartistojn en ekspozicia festeno.

- Nu, kion vi opinias pri mia pentroarto? Sxi demandas al konatulo.

- Pardonon, sinjorino. Chu mi respondu kiel artisto aù kiel gasto invitita?.